
# ESPERANTO

sub la suda kruco

septembro 2024




Esperanto-
urbo
(paĝo 9)




# ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

**OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ**
Volumo 31[3] numero 155, septembro 2024

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
**Redaktisto**: Terry Manley
**Provlegantoj**: Donald Rogers, Trevor Steele, Nicole Else
**Kunordigisto:** Jonathan Cooper
**Kontaktadreso:** **esk@esperanto.org.au**

AEA – ESK
GPO Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Australia

**Abonoj kaj pasintaj numeroj**
*Esperanto sub la Suda Kruco* estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:
AEA: **www.esperanto.org.au** / **info@esperanto.org.au**
NZEA: **www.esperanto.org.au** / **esperantonewzealand@gmail.com**

**Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruco**
Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, **esk@esperanto.org.au**

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn tradukojn (ekzemple per Google Translate).

**Limdato por kontribuoj por la sekva numero**
1a de novembro 2024

La redaktistoj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright @ 2024 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380

**SUR LA KOVRILO:** *Statuo de Zamenhof en Herzberg am Harz* – Vidu paĝon 9.  Pri aliaj fotoj, vidu paĝon 30.

# ENHAVO


| | |
|---|---|
| Antaŭparolo | 04 |
| Arto estas por ĉiuj | 05 |
| Esperanto-urbo | 09 |
| Feliĉa renkonto | 12 |
| Poeziangulo | 13 |
| Ĉu ni havas libervolon? | 14 |
| Esperanto-stratoj en Aŭstralio | 18 |
| Enigmoj: Birdoj de Aŭs. kaj N-Z | 21 |
| Tanzanio: diverseco kaj aventuroj | 23 |
| Safario en Tanzanio | 25 |
| Pli el "La knabino kun la longa hararo" | 27 |
| Kongreso kaj somerkursaro 2025 | 29 |
| Agnoskoj pri fotoj | 30 |

# Antaŭparolo

**TERRY MANLEY**

Je la fino de junio mi revenis al Armidale de ferio norde kaj feliĉe povis renkonti Christopher Kelen, antaŭ ol li suden iris post mallonga resto en Armidale. Christopher nuntempe prilaboras antologion dulingvan de aŭstraliaj kaj nov-zelandaj poetoj. Christopher (aŭ Kit – tiel li nomas sin) tradukas el la angla al Esperanto. La poemoj estas aktualaj, do modernstilaj. Ĝis nun li havas kontakton kun proksimume 140 poetoj kaj planas havi po unu poemon de ĉiu en la libro. En la lasta ESK aperis poemo de unu el tiuj poetoj, kaj en ĉi tiu numero alia aperas: poemo de Kit mem, pri Dangar-Akvofalo proksime al Armidale.

Refoje AEA okazigos kongreson kaj somerkursaron, ĉifoje inter la 5a kaj 11a de januaro 2025, en Adelajdo, kun instruistoj Trevor Steele, eminente konata autoro, kaj Hoan Trần (Ĝojo), sperta kaj energiplena instruisto el Vjetnamio. Vizitu **esperanto.org.au/kongreso** kaj aliĝu.

Artikolo de Joanne Johns aperas en ĉi tiu numero, pri Esperanto-monumentoj en Aŭstralio. Temas plejparte pri stratoj en diversaj lokoj. Scivolema pri kiel la stratoj akiris tiujn nomojn, mi iom esploris per **trove.nla.gov.au**, retejo de la nacia biblioteko. Mi ne ankoraŭ sukcesas, sed trovis interesajn artikoletojn pri Esperanto. Ekz-e, de *The Brisbane Courier*, la 29an de februaro 1928:

"Mr and Mrs W.A. Muirhead (Ipswich) are spending a few weeks' holidays at Esperanto Cottage, John Street." [Gesinjoroj W.A. Muirhead (Ipswich) restas kelkajn semajnojn de feriado ĉe Esperanto-Dometo, Strato John.] Do kie estas Strato John?



*Zebroj en Tanzanio: vidu paĝon 25*

# Arto estas por ĉiuj

## JOANNE JOHNS (MELBURNO)

FIRST (retejo: **www.firstservice.inc** Instagramo: **@firstservice_ability**) estas kvinslanda firmao, kiu ofertas apogadon kaj instruadon al diverskapabluloj. Ili lastatempe organizis inkluzivan art-eventon, nomita “Grind” (Grinci). Homoj de ĉiuj aĝoj kaj kapablecoj povis – kontraŭ enirkotizo de $30 – ricevi kaj pentri rultabulon, por eniri la konkurson.

FIRST ricevis 75 kontribuojn el ĉirkaŭ Aŭstralio, kaj montris ilin ĉe ekspozicio en Coomera, ĉe la Ora Marbordo. La plej juna kandidato estis naŭ jaraĝa. Mi kontribuis tri rultabulojn, montritaj sube. La dekstra havas paĝojn el Esperanta libro en la fono.



*Artaĵoj de Joanne Johns, de maldesktre:* La Furio de Siegfried, Tenante Ombrojn, La Mondo Nevidata

La kvalito de la artaĵoj estis tre alta, kaj la diverseco de la temoj kaj stiloj igis la ekspozicion unu el la plej bonaj, kiujn mi iam vidis. Mi ne enviis la kvar juĝantojn, kiuj devis trovi gajnintojn en tri kategorioj: malferma, apogata, kaj studenta. Tamen, mi ja devis fari similan taskon, kaj voĉdoni por la premio “Elekto de la Popolo”.

Sur la sekvaj paĝoj estas fotoj de kelkaj el la rultabuloj. Iuj estis aĉeteblaj, iuj ne, kaj FIRST mem aĉetis unu tabulon el ĉiu kategorio.

La teamo subtenanta ĉi tiun eventon jam planas estontajn, kaj la venonta, espereble en Novembro, temos pri memeldonaĵetoj konataj kiel “*zines*” en la angla. *Daŭras* **>**







*De supra maldekstre: 2a premio, apogata kategorio:* Emocio de Imago, *Elise Higginson; 2a premio, studenta kategorio:* Voĉoj de Unueco, *Seear Sadaqat; Plej bona burĝonanta artisto:* Nevidebla al Videbla, *Holly Fitts;* Rajumi min Supren, Rultabululo, *Mark Alston; 1a premio, malferma kategorio:* Ĝardeno de Ravo, *Cherryl Leigh;* Drakokulo, *Peter Collins;* Sola Lupo, *Helena McMahon.*





*De maldekstre:* Sinjoro, *Aaron Hine; Elekto de la Popolo:* Funga Fantazieto, *Gabriela Fuentes; 1a premio, apogata kategorio:* Magia Fungo, *Caane Taylor*

*De maldekstre: 2a premio, malferma kategorio:* Dueco, *Brett Cliffton;* La Ministo, *John Mehau;* La Rekvizito, *Travis Turvey.*













*De supra maldekstre:* Morto kaj Reviviĝo, *Madeline Baker;* Rompita Ligilo, *Tim Burden;* Nigra Vidvino, *Cherryl Leigh;* Mortcerta Trud-Okulo, *Adam Niven;* Feroca Evoluiĝo, *Stuart Grotherr;* Grandpieda Lun-araneo, *Adrian Colley;* Anubo, *Isaac Sheriff;* La Malsovaĝigita Besto, *Juno Leavesley;* Akrila Ardeo, *Taylah Jade;* Geometrio, *Christopher Tan;* Murphy, *Brett Cliffton;* Surfa Sonĝado, *Rhys Ahearn; 1a premio, studenta kategorio:* Frankenstein Knabinoj, *Zoe McBurney;* Freneza Drako, *Axel McElhone.*

# Esperanto-urbo

**DAVID ROCKELL (AŬKLANDO)**

Kiam mi alvenis ĉe la Esperanto-Centro en Herzberg, jam okazis festo. Zsófia Kóródy, la estrino de la Centro, ĵus ricevis ordenon de la Federacia Prezidento de Germanio. Iu komentis, ke nun estas duobla festo – jen gasto el Nov-Zelando.

Mi devas noti, ke mi trovis la Centron tute facile. Necesis nur sekvi la vojmontrilojn, kiuj klare montris la vojon ekde la ĉefa strato de la urbo. Ili ankaŭ donas en Esperanto direktojn al la urbodomo, la biblioteko kaj aliaj gravaj konstruaĵoj.




*Bildo 1: Ĉe la stacidomo*

En Bildo 1, mi staras ĉe la ĉefa stacidomo. Vidu kiel oni aldonis supre de la urbonomo la sciigon, ke ĉi tiu estas la Esperanto-urbo.

Tuj ekster la stacidomo estas Esperantoplatz (Bildo 2), kun monumento en formo de modela vagono por Joachim Gießner, kiu estis la stacidomestro, kaj ankaŭ la prezidanto de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio.

Nun ni venas al la Esperanto-Centro (Bildo 3), kie oni hisis la Nov-Zelandan standardon honore al la gasto. Ne estis sufiĉe da vento por montri ĉiujn stelojn de la Suda Kruco.

Notinde estas, ke en la supra etaĝo troviĝas la plej granda Esperanta biblioteko, kiun mi iam vidis. Ĝi kovras preskaŭ ĉiun muron de tri ĉambroj.

Tute apud la ĉefa strato estas Zamenhofplatz (Bildo 4). Dekstre vi vidos akvomuelilon, kiu efektive generas elektron. Sur la kovrilo estas pli proksima foto de la statuo.

*Daŭras* **>**



*Bildo 2: Esperantoplatz*

Zsófia montris al mi la ŝildon, kiu memorigas pri la ĝemelurbo Góra en Pollando. Ŝi ne estas kontenta, ĉar ŝi ĵus rimarkis, ke iu detruis la vojmontrilojn kun distancoj al Góra kaj aliaj urboj. Ankaŭ vandalismo estas internacia!

Fine, ŝi veturigis min al Pöhlde (Bildo 5), kie estas la plej granda fonto de karsto en Eŭropo – jen kial la akvo havas tiun koloron. Subteraj fontoj liveras 5000 litrojn da akvo ĉiun sekundon.



*Bildo 3: La Esperanto-Centro*



*Bildo 4: Zamenhofplatz*

Kun dankoj al la lokaj esperantistoj, kaj precipe al Zsófia, kiuj montris al mi multe da gastameco, mi devas diri, ke mi ĝuis miajn du tagojn en Herzberg, la Esperanto-urbo en Germanio. Se iu loĝanto de tiu urbo ne scias pri Esperanto – tiu vagas tra la urbo kun okuloj fermitaj. ◼



*Bildo 5: David ĉe Pöhlde*

# Feliĉa renkonto

**FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)**

Pro la projekto de la Viktoria registaro forigi kiel eble plej da fervojaj transirejoj, busoj anstataŭas trajnojn, kaj malfacilas antaŭvidi kiom da tempo necesos por atingi sian destinon. Tial mi alvenis frue al la flughaveno kaj sidis sur unu el la seĝoj starantaj en du vicoj dors-al-dorse por legi.

Post kelkaj minutoj iu knabo surgenuis sur malantaŭan seĝon je mia dekstro. Kiam mi turnis la kapon al li, li transiris al la maldeskstra seĝo. Kiam mi turnis la kapon al la maldekstro, li kuris al la dekstro. Mi rapide komprenis, ke li volis iom ludi kaj avertis lin, ke mi povis vidi lin kvankam li ŝanĝis sian lokon. Ni daŭrigis la konversacion. Finfine li demandis kian libron, mi legas, ĉu legendoj? Mi klarigis al li, ke temas pri anekdoto kies roluloj estas la patrino kaj la filo. Li nepre volis scii la titolon de la libro. Mi informis lin, ke estas “I don’t need you any more” (mi vin ne plu bezonas). Je mia surprizo, li aldonis: “Ah, jes, same, kiam mi estos pli aĝa, mi ne plu bezonos mian patrinon.“ La patrino, kiu intertempe alproksimiĝis por kontroli kun kiu parolas la filo, tuj etendis la brakojn al li, dirante: “Ne, mi amas vin.” Por trankviligi la patrinon, li eniris la etenditajn brakojn kaj metis sian kapon kontraŭ ŝian vizaĝon.

Malgraŭ sia junaĝo – ĉirkaŭ kvin – tiu knabo, mi pensas, jam spertis ke “amo” povas esti peza kaj malhelpi eksperimentojn necesajn por malkovri la mondon laŭ propra sinteno.



Malfacilas saĝe ami, senti kiam protektado necesas kaj kiam preferindas lasi al la amato tutan liberecon, aparte kiam temas pri rilato inter gepatroj kaj gefiloj, sed ne nur.

Kiam li foriris, la knabo petis la patrinon foti nin por ke li ne forgesu min. Jen mallonga renkonto, okazo por longa meditado pri fundamenta rilato inter homoj. E

# Poeziangulo

**KIT KELEN (MARKWELL, NSK)**

## lasta lumo ĉe Dangar-Akvofalo

krudaj klifoj
la tute-fala pezo de ĝi
paletroglito de la tranĉilo

por atesti ĉi tion, vertiĝa

mortaj membroj krucitaj
languigado

fali
longen malsupren

kaj la dolĉaj senmovaj nuboj

ŝtonoj likeno lumigita

kvazaŭ la rivereto scius nenion
pri kio estas preter la kurbo

kaj kie la akvoj ankoraŭ kolektiĝas
glazuro de suno rakonti

sekan muskon
kaj arbŝelfaloj

suprenkantante!
per trila trako
babiladas daŭre

bovkverko por venteto
barilpikitaj suproj

kaj la paŝtado apude


brutara nigra stopla kvieto
flava grizo
kaj ankaŭ la verda griza

la frapturdo kunfandiĝas
en foliara faldo

mi vidas la milionon da jaroj ĉi tie
kaj milionon pli

preter la lasta
la faloj laboregas
en enblovo de freŝa aero

ni foriras




# Ĉu ni havas libervolon?

## JONATHAN COOPER (GOSFORD, NSK)

Ĉu vi estas libera? Ĉu libera elekti kion vi faras kaj fari decidojn? Aŭ ĉu vi estas ne kapabla decidi ion ajn por vi mem? Vi sentas, ke vi regas vian vivon, aŭ almenaŭ tion, kion vi matenmanĝos. Sed tio povas esti iluzio. Fiziko efektive povas devigi vin travivi la vivon kvazaŭ sur reloj, tute sen libervolo.

Vi spertas libervolon la tutan tempon. Ekzemple, kiam vi decidis legi ĉi tiun artikolon anstataŭ fari ion alian. Libervolo estas via kapablo mem decidi kion vi faros. Ĝi signifas, ke la estonteco estas malferma areno, kiun vi povas formi per viaj agoj. Ĝi estas la kerno de homaj rilatoj; tio signifas, ke vi respondecas pri viaj agoj, kio estas la bazo de niaj moralaj kaj juraj sistemoj.



Tamen ĉu libervolo fakte eblas?

Du ĉefaj filozofiaj flankoj batalas pri tio. Unu flanko asertas ke la koncepto de libervolo estas principe malkongrua kun la principoj de la universo:

### **“Vi ne havas libervolon”**

Kio ajn “vi” estas iel konsistas el fizika cerbo kaj korpo. Kaj tiuj estas faritaj el ĉeloj, kiuj estas faritaj el proteinoj, kiuj estas faritaj el molekuloj, kiuj estas faritaj el atomoj, kaj tiel plu.

Do esence, vi estas specifa, dinamika aranĝo de partikloj. Partikloj ne havas volon, nek instigon, nek liberecon; ili blinde sekvas la principojn de fiziko. Kaj ni ne scias kial, sed plej multaj principoj de fiziko estas determinismaj. Tio signifas, ke aferoj tiel okazas pro la aferoj kiuj antaŭe okazis.

Se vi ludas bilardon kaj trafas globon je specifa rapideco kaj angulo, la principoj de fiziko determinos precize kiel ĉiuj globoj sur la tablo poste kondutos: iliaj rapidoj, resaltaj direktoj, ĉio. Tiuj principoj tute decidas la konduton de ĉiuj globoj sur la tablo. Je la mikroskopa nivelo, aferoj funkcias tre tiel, tamen sen ludantoj. Agoj kaj reagoj influas ĉiujn partiklojn en la universo, kreante ĉenon de kaŭzitaj efikoj, kiu etendiĝas tra la tempo, de la pasinteco ĝis la estonteco. Aferoj okazas, farante aliajn aferojn okazi.

Nun imagu ke se, tuj post la Praeksplodo, supersaĝa superkomputilo rigardus ĉiun unuopan partiklon en la universo kaj notis ĉiujn iliajn ecojn. Nur uzante la determinismajn principojn de fiziko, ĝi teorie povus antaŭdiri kion ĉiuj ekzistantaj partikloj faros ĝis la fino de tempo.

Sed se vi estas farita el partikloj, kaj estas teknike eble kalkuli kion partikloj faros eterne, vi neniam decidis ion ajn. Via pasinteco, nuntempo kaj estonteco jam estis antaŭdifinitaj je la Praeksplodo. Tio signifus, ke ekzistas ia sorto kaj vi ne rajtas decidi ion ajn.

Vi eble sentas, ke vi faras decidojn, sed vi efektive agas laŭ aŭtomata piloto. La movoj de la partikloj, kiuj konsistigas viajn cerbajn ĉelojn, kiuj igis vin legi ĉi tiun artikolon, estis deciditaj antaŭ 14 miliardoj da jaroj. Vi estas nur tie kiam ĝi okazas. Vi nur rigardas kiel la “universo” en vi disvolviĝas realtempe.

Sed tio ne povas esti vera pro kvantuma fiziko, ĉu? Kvantumaj procezoj estas interne hazardaj, ne determinismaj, kaj ne povas esti antaŭviditaj tutcerte. Sur la kvantuma bilardtablo, globoj povas iri hazarde maldekstren aŭ supren aŭ ien ajn. Ilia konduto ne estas fiksita de tio, kio antaŭe okazis, sed estas hazarde “decidita” realtempe.

Sed por la kredantoj pri “neniu libervolo”, tio ne influas ilian argumenton. Ili pensas ke, ĉar kvantumaj procezoj estas hazardaj, ili ne permesas al vi fari iujn ajn decidojn. Ĉar, se ekzistas hazardo por la aferoj, kiuj esence konsistigas vian cerbon kaj korpon, tiuj hazardaj procezoj faras la decidojn por vi. Kiel?

Ni diru, ke elektrono povas hazarde iri dekstren aŭ maldekstren. Se ĝi iras maldekstren, ĝi ekigas elektrajn kurentojn inter viaj neŭronoj, kiuj kreas neŭronan procezon, kiu ekigas longan ĉenon da agoj, kiuj igas vin legi ĉi tiun artikolon. Aŭ ĝi iras dekstren kaj igas vin purigi vian ĉambron. Nur ĉar la ĉeno estas ekstreme kompleksa, ne signifas ke vi havas ajnan regon pri ĝi.

Do eble via sorto ne estis decidita je la Praeksplodo sed ĝi estas decidita en ĉi tiu momento. La grava afero estas, ke ĝi ne estas decidita de vi. Vi ne havas

*Daŭras* **>**



influon pri tio; vi ne havas liberan volon.

Ho! Tio estas malfeliĉiga ĉar la argumento esence ŝajnas havi sencon. Tamen, "Ne!", krias la libervola flanko, "Tio estas vere malbona maniero por pensi pri la universo."

### "Vi ja havas libervolon"

Ni scias, ke ni povas redukti ĉion, kio ekzistas, al ĝiaj bazaj partikloj kaj la principoj, kiuj regas ilin. Kvankam tio ŝajnigas fizikon kiel la sola scienca disciplino kiu efektive gravas, estas problemo: Oni ne povas klarigi ĉion en la universo nur laŭ partikloj.

Unu ĉefa fakto pri la realo, kiun ni ne povas klarigi nur rigardante elektronojn kaj kvantumaĵojn estas io kion mi nomas **emerĝo** (en la angla, *emergence*). Emerĝo estas kiam multaj malgrandaj aferoj kune kreas novajn fundamentajn trajtojn, kiuj antaŭe ne ekzistis.

Guto da akvo estas nur $H_2O$-molekuloj (~1.67 × $10^{21}$ da ili). Se vi ricevas akvon sur vian vestaĵon, ĝi malsekiĝas. Sed kio fakte estas malsekeco? $H_2O$-molekuloj ne estas malsekaj. Sed viaj vestaĵoj certe estas nun malseka. Multaj malgrandaj aferoj kune kreis ion novan, kiu ne ekzistas je la nivelo de la individuaj molekuloj.

Emerĝo okazas je ĉiuj niveloj de la realo, kaj la realo ŝajnas esti organizita en tavoloj: atomoj, molekuloj, ĉeloj, histoj, organoj, vi, socio. Metu multajn aferojn kune en unu tavolon kaj ili kreos la sekvan tavolon. Ĉiufoje kiam ili faras tion, tute novaj trajtoj aperas.

Unu atomo ne povas pritrakti informojn, sed multaj el ili kune povas formi DNA-molekulon. Molekuloj ne vivas, sed multaj el ili povas formi ĉelon, kaj ĉeloj vivas. Per ĉiu salto supren laŭ la ŝtuparo de kompleksec o, ŝanĝiĝas la principoj pri kio eblas. Tute novaj aferoj aperas, kiuj estas multe pli ol la sumo de iliaj partoj. Kaj jen rompiĝas la reduktisma vidpunkto de la universo.

La tavoloj de la realo bezonas unu la alian por havi sencon. Vi povas klarigi vivaĵojn per ĉeloj, ĉelojn per molekuloj kaj molekulojn per atomoj. Sed pro emerĝo, oni ne povas komenci per kvantumaj partikloj kaj rekonstrui la universon. Oni ne povas ekspliki galaksiojn aŭ homan psikologion per kvantuma fiziko.

Tio ne estas la tuta afero. La realo estas

ne nur strukturita en tavoloj sed ial, la tavoloj ankaŭ estas plejparte sendependaj unu de la alia. Aferoj ekzistantaj ene de la sama tavolo povas influi unu la alian kaj eble unu tavolon supran aŭ malsupran. Sed ofte ili ne influas aferojn multe pli suprajn aŭ malsuprajn. Por ekscii kiel organoj funkcias, oni ne bezonas kvarkojn. Por kompreni politikon, oni ne bezonas scii pri ĉeloj. Se oni volas ekspliki aferojn kiuj okazas en unu tavolo, oni povas fari tion nur restante proksime al tiu tavolo.

"Ne!" krias la ne-libervola flanko, "Vi ne povas simple uzi magion por ekspliki libervolon!"

Sed la emerĝa argumento ne alvokas magion. Ĝi nur diras, ke pensi pri libervolo laŭ determinismo kaj fundamentaj principoj estas sakstrato, ia kategoria eraro. Ĝi estas parto de reduktisma skolo de pensado pri la universo, kiu tre sukcese regis sciencon dum longa tempo, sed tio estas defiita de emerĝo.

Do eble, provi kompreni libervolon, rigardante fundamentajn partiklojn, determinismajn principojn kaj kvantuman fizikon, maltrafas la demandon. Tio kion ni devus demandi, estas "Kiu tavolo de la realo rilatas al libervolo?"

Nu, same kiel neniu individua molekulo kreas malsekecon, neniu ĉelo en via cerbo volas legi artikolon. Sed je unu tavolo pli supra, via cerbo, farita el 80 miliardoj da interligitaj neŭronoj, faras tion. Sur tiu tavolo aperas ĉiuj aferoj rilataj al vi: via konscio, personeco, sentoj, viaj timoj kaj revoj. Jen kie vi emerĝas. Vi ne scias kial kaj kiel, sed vi scias, ke vi ja estas ĉi tie, ĝuste nun. Kiel ĉiuj aferoj okazantaj en via cerbo interludas por fari vin tia estas tute malsama afero. Sed sur tiu tavolo de la realo, vi estas parto de la decida procezo. Vi estas formita de viaj decidoj kaj viaj decidoj estas formitaj de vi. Vi havas rajton decidi pri tiu tavolo de la realo.

Vi ne nur rigardas kiel la "universo" en vi disvolviĝas – vi efektive partoprenas en ĝi. Kaj vi rajtas fari kion ajn kiun vi opinias taŭga. Almenaŭ tiel iuj en la libervola flanko pensas pri tio.

## Konkludo kaj opinio

Do kiuj pravas? Ĉu ekzistas libervolo? Mi ne certas. Sed pensu pri tio: Se vi kredus, ke libervolo ne ekzistas, ke ĝi estas nur iluzio, de kie venus tiu kredo? Ĉu ĝi estus nur la rezulto de sennombraj agoj kaj reagoj de partikloj kaj hazardaj kvantumaĵoj? Se jes, kia konekto ekzistus inter tiuj kaj "la vero"? Oni ne povas pruvi, ke pruvoj ne ekzistas, aŭ tute ne gravas. Estus kiel oni forigus la grundon sur kio oni staras.

Tamen, eĉ se ni ne havas libervolon, ne estas klare, kion tio ŝanĝas por praktikaj celoj. Vi kaj ni, ni homoj, sur pure subjektiva bazo, sentas ke ni ja havas libervolon kaj ke niaj decidoj estas nia faro. Kvankam ni ne certas ambaŭflanke, se vi sentas, ke vi faras decidojn, kio gravas se supersaĝa superkomputilo povintus kalkuli la estontecon je la Praeksplodo? Aŭ se kvantumaĵoj hazarde puŝas viajn ĉelojn unudirekten aŭ alidirekten? Libervolo kiu ŝajnas libera, estas sufiĉe bona por ni.

Ĉiuokaze, nun vi povas decidi kion fari nun. Eble fari iun laboron? Aŭ legi alian artikolon? Estas via decido. Verŝajne.

Tio artikolo estas bazita sur videaĵo de Kurzgesagt, *Do You Have a Free Will?* (**youtu.be/UebSfjmQNvs**) ■



# Esperanto-stratoj en Aŭstralio

**JOANNE JOHNS (MELBURNO)**




Mi lastatempe malkovris ekzempleron de *Monumente pri Esperanto,* verkita de Hugo Röllinger kaj eldonita de la Universala Esperanto-Asocio en 1997. En la libro estas kolekto de pli ol mil objektoj ĉirkaŭ (kaj preter) la mondo nomitaj honore al Esperanto/Esperantistoj. Ĉi tiuj inkluzivas (inter aliaj) stratojn, arbojn, parkojn, tabulojn, monumentojn, konstruaĵojn, kaj eĉ asteroidojn.

Bedaŭrinde kelkaj el la listigitaj objektoj en Aŭstralio ne plu estas troveblaj, sed la stratoj daŭras, do ni iomete esploros pri ili en ĉi tiu artikolo.

### Esperanto Way – Westminster, Okcidenta Aŭstralio

Dudek minutojn norde de Perto estas ĉevalŝu-forma strato nomita *Esperanto Way*. En la libro, ĉi tiu strato estas listigita sub “Stirling” (la regiono) kaj “Balga” (la




*Esperanto Way, Westminster*

antaŭurbo). Westminster antaŭe estis la suda parto de Balga, sed oni renomis ĝin en 1995 laŭ peto de la enloĝantoj.

La domoj en *Esperanto Way* estas plejparte unu-etaĝaj kaj konstruitaj el brikoj, kun 3 aŭ 4 litĉambroj kaj grandaj kortoj. Estas du parkoj apud la strato – unu apartigas la domojn de la apuda ŝoseo, kaj la alia enhavas porinfanan ludejon.

**Esperanto Street – Redcliffe, Kvinslando**

Kvardek minutojn norde de Brisbano troviĝas *Esperanto Street* en Redcliffe. Kiam ĝi ricevis la nomon en Decembro 1963, estis nur kelkaj domoj, ĉirkaŭitaj de farmbienoj kaj arboj, sed nun la tuta antaŭurbo estas plena je domoj.

Pro la tropika klimato, la tri-litĉambraj domoj estas plejparte laŭ la kutima "kvinslanda" stilo – ligno, kaj levitaj por permesi la fluon de aero sub la domo. Multaj arboj estas en la ĝardenoj, kaj palmoj estas popularaj.




*Esperanto Street, Redcliffe*



*Esperanto Court, Kearneys Spring*

**Esperanto Court – Kearneys Spring, Kvinslando**

Preskaŭ du horojn okcidenten de Brisbano, en la sudo de Toowoomba, estas *Esperanto Court*. Brakumita de arbaro kaj ĉe la rando de la antaŭurbo Kearneys Spring, la domegoj ĉi tie estas 4 aŭ 5 litĉambraj, kun 2 aŭ 3 banĉambroj.

Laŭ la libro, ĉi tiu strato estis nomita en 1990.

**Esperanto Court – Oak Park, Viktorio**

*Esperanto Court* en antaŭurbo 25 minutojn norde de Melburno, havas miksaĵon de unu kaj du-etaĝaj brikaj domoj kun tri aŭ kvar litĉambroj. Je la fino de la strato estas piedirejo kiu kondukas vin al parko.

Ĉi tiu strato ne estas listigita en la libro, ĉar ĝi estis nomita post la eldonado.

Petro kaj mi vizitis ĝin antaŭ kelkaj jaroj kaj faris la apudan foton. *Daŭras* **>**

*Esperanto Court, Oak Park*



**Esperanto Street – Benalla, Viktorio**

Benalla situas nord-oriente de Melburno, du kaj duono horojn for, survoje al la norda bordo de Viktorio. *Esperanto Street* estas unu el du "verdaj" stratoj en Benalla. Ĝi estas mallarga strato paralela al pli granda strato, kaj je la fino estas elektra subcentralo.




*Esperanto Court, Oak Park*




*Esperanto Street, Benalla*

La domoj en la strato estas unu-etaĝaj, brikaj, kaj havas ĉefe tri litĉambrojn.

**Barrington Street – Benalla, Viktorio**

Ne tro for de Esperanto Street (vi povas vidi la saman elektran subcentralon en la bildo) estas *Barrington Street*, nomita memore al Doktoro Arthur E. Barrington, 1862-1919. Li starigis Esperanto-klubon en 1907 kaj fondis la unuan aŭstralian Esperanto-revuon, *The Australian Esperantist,* en 1908.

Pli arboplena ol *Esperanto Street*, Barrington Street tamen havas samstilajn domojn.

La tombo de D-ro Barrington estas parto de la historia tombeja promenado, reklamita de la Benalla tombejo. E

**Ĉiuj mapoj © OpenStreetMap**
**openstreetmap.org/copyright**
**Licencite sub la Open Data Commons Open Database License (ODbL) fare de OpenStreetMap Foundation (OSMF)**




*Barrington Street, Benalla*

# Enigmoj: Oftaj birdoj de Aŭstralio kaj Nov-Zelando

**VICKY CRICKETT (TAURANGA, N-Z)**

La indikvortoj estas en Esperanto; ĉu vi povas trovi la anglajn tradukojn en la krado? (Respondoj sur paĝo 29)

| | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| S | D | H | B | S | G | Q | X | N | O | I | S | Y | M | I | N | E | R | A | L | Q | U |
| U | C | U | E | X | R | D | K | T | N | O | S | D | C | A | X | J | L | W | N | R | U |
| L | H | D | W | A | Q | Z | D | E | O | N | H | G | B | Q | W | T | W | B | E | F | Y |
| P | A | P | F | S | I | L | V | E | R | E | Y | E | J | I | A | U | Y | R | U | H | S |
| H | F | M | H | D | S | A | W | X | N | R | W | F | B | X | R | F | E | Q | T | K | P |
| U | F | G | U | X | R | O | J | A | Y | X | A | L | O | B | B | K | U | G | L | B | A |
| R | I | J | P | N | L | S | T | A | R | L | I | N | G | E | L | L | Y | F | Y | P | R |
| C | N | L | K | L | I | T | T | W | A | E | Q | E | B | L | E | Q | W | L | G | U | R |
| R | C | O | A | I | H | H | Q | S | Q | B | Q | W | S | L | R | B | G | K | P | R | O |
| E | H | W | U | K | Z | R | F | N | A | O | V | K | Z | B | Z | V | S | N | T | C | W |
| S | S | O | G | C | M | U | K | L | N | F | L | Z | I | I | U | E | K | I | M | Y | V |
| T | V | A | I | A | J | S | D | S | X | C | W | S | D | R | R | O | S | E | L | L | A |
| E | R | B | R | G | N | H | A | X | V | T | A | R | Q | D | F | U | C | H | K | E | U |
| D | R | A | I | N | B | O | W | L | O | R | I | K | E | E | T | A | A | E | O | A | M |
| C | Q | T | P | U | P | H | X | U | R | B | C | H | C | N | K | Z | H | O | O | W | B |
| O | O | Z | Y | B | A | M | T | P | K | F | J | G | Q | A | W | X | D | P | K | U | P |
| C | M | C | M | L | Y | N | V | C | D | K | H | W | P | Z | K | C | L | T | A | R | T |
| K | H | A | A | Y | D | H | A | M | U | W | Q | U | M | A | N | S | A | U | B | Q | E |
| A | J | G | G | O | N | L | C | F | W | H | I | T | E | I | B | I | S | I | U | O | R |
| T | X | V | E | P | B | A | C | Y | N | C | T | Z | G | D | M | I | B | E | R | F | S |
| O | P | J | X | G | I | R | T | F | A | N | T | A | I | L | A | V | R | W | R | L | N |
| O | B | U | T | C | H | E | R | B | I | R | D | Z | Y | T | A | U | R | Z | A | I | B |

ARĜENTOKULA ZOSTEROPO
BLANKA IBISO
BLANKGORĜA PROSTEMADERO
BRANA FRINGO
ĈIELARKA LORIKITO
DOMPASERO
GALAHA KAKATUO
ĜERIGONO
HIRUNDO
KORNIKO
KSENIKO
KUKABARAO
MANORENO
MERLO
MINAO
PIGA GIMNORINO
RIPIDURO
ROZELO
SONORILA ANTORNO
STURNO
SULFURTUFA KAKATUO
TURDO
VIOLDORSA KOLOMBO

*Daŭras* **>**

La indikvortoj estas en la angla, ĉu vi povas trovi la Esperantajn tradukojn en la krado?
(Respondoj sur paĝo 29)

| | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| B | R | A | N | A | F | R | I | N | G | O | K | Ŭ | O | A | M | I | N | A | O | E | D |
| L | L | Ĵ | T | N | Ĵ | L | Ŝ | L | J | Z | U | V | K | J | Ĥ | J | H | U | Ŝ | T | R |
| A | U | A | B | M | Ĉ | I | E | L | A | R | K | A | L | O | R | I | K | I | T | O | P |
| N | U | Ĝ | N | T | U | R | D | O | J | O | A | R | B | O | R | T | F | M | H | O | M |
| K | L | V | E | K | H | I | B | M | R | I | B | Ĝ | N | Ĉ | Ĉ | N | N | V | N | U | O |
| G | K | R | D | F | A | B | Ĝ | U | E | Ŝ | A | E | Z | C | V | O | I | R | V | L | S |
| O | V | R | B | O | M | I | D | Ĥ | D | Z | R | N | N | Ĝ | U | R | O | K | E | P | U |
| R | I | I | A | O | M | I | B | I | V | O | A | T | K | T | D | T | I | Z | O | I | L |
| Ĝ | O | V | O | K | P | P | K | I | N | Ĉ | O | O | A | N | N | H | O | K | Ĵ | G | F |
| A | L | B | Ĝ | I | T | C | A | A | S | Ŭ | N | K | Ŭ | A | M | R | Ŭ | O | O | A | U |
| P | D | N | R | G | F | I | M | S | U | O | A | U | A | S | I | N | P | N | A | G | R |
| R | O | H | J | I | I | C | K | P | E | K | C | L | N | J | P | N | R | F | Ĝ | I | T |
| O | R | F | A | B | H | Z | M | O | A | R | I | A | L | U | N | U | J | Ŝ | Ĉ | M | U |
| S | S | Ĉ | C | A | G | Ŝ | B | H | T | R | O | Z | A | O | T | A | L | Ĝ | Ĉ | N | F |
| T | A | F | T | L | T | Ĵ | A | I | O | I | G | O | I | S | T | Ĥ | Ĝ | S | M | O | A |
| E | K | K | K | I | R | L | G | N | H | Z | V | S | K | Ĝ | Ŭ | J | E | Ŭ | R | R | K |
| M | O | K | S | J | A | H | O | K | I | A | P | T | L | T | Ĉ | Z | R | Ŝ | U | I | A |
| A | L | R | E | G | Ĝ | S | C | K | R | P | G | E | B | A | Z | F | I | I | Ĉ | N | K |
| D | O | Ĵ | N | D | Ĵ | A | B | Ŝ | U | Ŝ | Ĝ | R | D | D | G | Ŝ | G | Ĵ | N | O | A |
| E | M | G | I | Ĉ | G | I | Z | V | N | P | D | O | K | M | A | T | O | J | Z | J | T |
| R | B | T | K | E | Ĵ | A | Ĉ | K | D | U | Ŝ | P | N | G | J | V | N | Z | G | H | U |
| O | O | H | O | N | L | Ĉ | A | M | O | Z | H | O | M | E | R | L | O | T | U | Ĵ | O |

BELLBIRD
BLACKBIRD
BUTCHERBIRD
CHAFFINCH
FANTAIL
GALAH
KERERU
KOOKABURRA
MAGPIE
MYNA
NOISY MINER
RAINBOW LORIKEET
RAVEN
ROSELLA
SILVEREYE
SPARROW
STARLING
SULPHUR-CRESTED COCKATOO
SWALLOW
THRUSH
TUI
WARBLER
WHITE IBIS
WREN

# Tanzanio, lando de diverseco kaj aventuroj

**HEATHER HELDZINGEN (MELBURNO)**




*La kongresejo*

Mi vojaĝis al Tanzanio kun mia filo, Leslie, por ĉeesti la 109an UK-on en Aruŝo, la unuan en Afriko. Ĝi okazis de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto. La kongreso traktis la temon "Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo". Finfine estis 874 kongresanoj, plejparte el Afriko. La partoprentantoj konstatis, ke tiu UK en Afriko plene sukcesis. Esperanto en Afriko estas vigla kaj plena de energio kun la plejmultoj el la Esperantistoj je juna aĝo!

La kongresejo situis en la Aruŝa Conference Centre, tre taŭga por niaj bezonoj kun manĝejoj sur la tegmento. Kiel kutime la programo estis plena je bonegaj paroladoj, muziko, teatraĵoj, dancado, libroservo ktp.

La nivelo de Esperanto de la afrikaj ĉeestantoj estis tre alta kaj ofte Esperanto estas ilia tria aŭ kvara lingvo post la svahila, la angla aŭ franca.

Fakte pli ol 100 lingvoj estas parolataj en Tanzanio, igante ĝin la plej lingve diversa lando en Orienta Afriko. La svahila estas utiligata en parlamenta debato, en la malsuperaj kortumoj, kaj kiel instrukciilo en bazlernejoj. La angla estas uzata en ekstera komerco, en diplomatio, en pli altaj kortumoj, kaj kiel instrumedio en altlernejoj, dum la araba estas parolata en Zanzibaro.

En la malfrua 19a jarcento, la regiono estis sub germana regado kiel Germana Orienta Afriko, kaj tio estis sekvita per brita regado post la 1a Mondmilito kun la nomo Tanganjiko, kaj la Zanzibara Insularo restis aparta kolonia jurisdikcio. Post iliaj respektivaj sendependiĝoj en 1961 kaj 1963, la du unuiĝis en 1964 por formi la Unuiĝintan Respublikon de Tanzanio . Hodiaŭ, la lando estas prezidenta konstitucia respubliko kun la federacia ĉefurbo situata en Government City, Dodoma. La antaŭa ĉefurbo, Daresalamo, retenas la plej multajn registarajn oficejojn kaj estas la plej granda urbo de la lando, ĉefhaveno, kaj komerca centro.

*Daŭras* **>**

La lando ne travivis gravan internan tumulton ekde sendependeco kaj estas rigardata kiel unu el la plej sekuraj kaj plej politike stabilaj en la kontinento. La populacio de Tanzanio konsistas el proksimume 120 etnaj, lingvaj, kaj religiaj grupoj. Kristanismo estas la plej granda religio en Tanzanio, kun islamaj kaj animismaj malplimultoj.

Tanzanio estas monta kaj dense arbarkovrita en la nordoriento, kie troviĝas la monto Kilimanĝaro, la plej alta monto en Afriko kaj la plej alta aparte staranta monto super la marnivelo en la mondo. Tri el la Grandaj Lagoj de Afriko estas parte ene de Tanzanio. Norde kaj okcidente kuŝas Viktorilago, la plej granda lago de Afriko, kaj Tanganjiko, la plej profunda lago de la kontinento, konata pro siaj unikaj specioj de fiŝoj.

Je 947 403 kvadrataj kilometroj Tanzanio estas la 13a plej granda lando en Afriko kaj la 31a plej granda en la mondo. Ĝi limas al Kenjo kaj Ugando norde; Ruando, Burundo, kaj la Demokratia Respubliko Kongo okcidente; kaj Zambio, Malavio, kaj Mozambiko en la sudo. Tanzanio situas sur la orienta marbordo de Afriko kaj havas hindoceanan marbordon proksimume 1 424 kilometrojn longan.

Ĉie en Tanzanio, samseksaj agoj estas kontraŭleĝaj kaj portas maksimuman punon de ĝismorta restado en malliberejo. Naŭdek kvin procentoj de tanzanoj kredas, ke samseksemo ne estas akceptebla en socio.

Homoj kun albinismo en Tanzanio ofte estas atakitaj, mortigitaj aŭ mutilitaj pro superstiĉoj ligitaj al la nigra-magia praktiko konata kiel *muti*, kiu asertas, ke korpopartoj de albinoj havas magiajn trajtojn. Tanzanio havas la plej altan oftecon de ĉi tiu malobservo de homaj rajtoj inter 27 afrikaj landoj kie *muti* estas praktikata.

Estas tre malmultaj resursoj por tanzanianoj laŭ kreditservoj, infrastrukturo aŭ havebleco al plibonigitaj agrikulturaj teknologioj, kaj tio pliigas malsaton kaj malriĉecon en la lando.Tanzanio viciĝas 159 el 187 landoj en malriĉeco laŭ la Homa Evoluo-Indekso de la Unuiĝintaj Nacioj. Tamen, tre vizitinda lando. E

| **Religioj en Tanzanio** | |
|---|---|
| Kristanismo | 63.1% |
| Islamo | 34.1% |
| Indiĝenaj Kredoj | 1.1% |
| Aliaj | 1.7% |



*Strato en Aruŝo*

# Safario al Naciaj Parkoj en Tanzanio

## HEATHER HELDZINGEN (MELBURNO)



*Supre: Monto Kilamanĝaro; Sube: Ĝirafoj*

UEA organizis diversajn antaŭ- kaj post-kongresajn ekskursojn. Mi elektis viziti la parkojn Ngorongoro kaj Tarangire kun vizitoj al Masajaj kaj Hadza triboj.

Ni vojaĝis en okseĝaj safariaj aŭtomobiloj kun tegmentoj, kiuj supreniris por ke oni povu stari kaj rigardi pli facile.

Ngorongo estas parko en kratero de mortinta vulkana kaldero en la Orienta (Granda) Rift-Valo. Ĝi estas la plej granda nerompita kaj neplenigita vulkana kaldero en la mondo. La kaldero mezuras inter 16 kaj 19 km larĝe kaj havas areon de 264 kvadrataj km. Enskribita kiel Monda Heredaĵo de Unesko en 1979 ĝi estas hejmo por Masaj-paŝtistoj, kiuj vivas en relativa harmonio kune kun la abunda faŭno de la regiono.

Post du-hora vojaĝo de Aruŝo, ni atingis la parkon kaj preskaŭ tuj vidis gregojn de ĝirafoj, gnuoj kaj zebroj. Ili alkutimiĝis al la aŭtoj, do ili venis tre proksime al ni. Post iom da vojaĝo, elefantoj aperis kune kun leonoj, verukaproj, kaj simioj. En lago ni vidis hipopotamojn kun akvobirdoj inkluzive flamengojn.

Post nia tagmanĝo, kiam simioj ŝtelis bananojn kaj aliajn manĝaĵon, ni vizitis masajan vilaĝon. Ili nun ne mortkaptas bestojn sed zorgas pri gregoj da bovoj kaj kaproj. Iliaj domoj estas konstruitaj de la virinoj el bovfekaĵo kaj cindro. Ili havas du tre malgrandajn dormĉelojn kun alia malgranda ĉambro por ĉio alia.

Ilia estas unu el la tre malmultaj triboj, kiuj retenis la plej multajn el siaj tradicioj, vivstilo kaj popolscio. Komune kun la faŭno kun kiu ili kunekzistas.

La tradicia masaja-dieto konsistas el ses bazaj manĝaĵoj: lakto, viando, graso, bovsango, mielo kaj arboŝelo.

La averaĝa alteco de masajaj viroj estas 190.5 cm kaj la viro vestas sin per ruĝaj manteloj. Ili dancas per saltado dum la virinoj ĉantas. La virinoj vestas sin per bluaj manteloj kun multe da juveloj kaj komplikaj harstiloj.

La venontan tagon ni vizitis alian tribon, la Hadzojn (*Bush Men*), aŭ *Hadzabe*, kiu estas protektita ĉasisto-kolektistaro kaj tanzania indiĝena etno, kiu vere vivas en la naturo. Tradicie, ili ĉefe furaĝas por manĝaĵoj, manĝante plejparte mielon, tuberojn, fruktojn, kaj, precipe en la seka sezono, viandon. La viroj ĉasas

*Daŭras* >



bestojn kiel simiojn, birdojn, aŭ cervojn kaj la virinoj fosas por tipo de ignamo (*yam*). Ili ankaŭ konstruas la dometojn kaj zorgas pri la infanoj. Ili estas nomadoj kaj nur restas en unu loko dum ses aŭ sep monatoj antaŭ ol trovi pli fekundan lokon. Ili mem faras la pafarkojn, sagojn, muzikinstrumentojn ktp. Ili montris al ni kiel fari fajron per du pecoj de ligno. En 2015, ekzistis inter 1 200 kaj 1 300 hadzaj homoj en Tanzanio. Nur ĉirkaŭ triono el la restantaj Hadzoj daŭre vivas ekskluzive per tradicia furaĝado.

Nia safario estis interesa, bela kaj plena da surprizoj. Vere estis unu el la plej ĝuindaj antaŭ-kongresaj ferioj, kiun mi iam partoprenis. E



*De supro:*

*Masajoj;*

*Leslie kaj Heather vestitaj kiel Masajoj;*

*Hadza dancado*



# El “La knabino kun la longa hararo”

## tradukita de TERRY MANLEY (ARMIDALE, NSK)

(Daŭrigita de la lasta numero)

### Laboraj jaroj

Nia familio estis izolita, sen sociuma vivo, pro la konstantaj malsanoj de la gepatroj. Se doni ekzemplon de mia naiveco, mi iris al la laborejo je Novjara Tago kaj malkovris, ke la fabriko estas fermita. Mi atendadis sed neniu estis en la strato. Tiam viro preterpasis min kaj mi demandis al li, ĉu li scias ion pri la fabriko, ĉar mi laboras tie. Li informis min, ke hodiaŭ estas publika ferio kaj mi devas reiri hejmen. Morgaŭ la fabriko malfermiĝos.

Mi komencis labori por la firmao en marto 1926 kaj restis tie ĝis marto 1930 kiam mi edziniĝis. Je la geedza festo, inter la malavaraj donacoj, estis ĉeko de la firmao por trimonata lupago por nia nova apartamento. Tiom estis granda sumo tiama.

Ĉe la fabriko por liftoj estis proksimume dudek inĝenieroj, desegnistoj kaj dezajnistoj plus proksimume dek sinjorinoj en la oficejo. Ĉiuj bezonis papervarojn kaj mi respondecis pri la mendo de tiuj. Iun tagon mi havis ideon: Mi petis la estron, ĉu mi povas mendi la papervarojn de mia patro, kiu proponis malpli altajn prezojn. La estro ridetis kaj konsentis. Mia patro ne havis tiajn papervarojn. Lia stoko estis tia de lernejoj kaj la ĝenerala publiko. Mi mendis de pograndisto kaj mem liveris la stokon. Je mia edziniĝo mi jam havis bonan profiton de tia entrepreno.

Mi lernis multon pri la teorioj de maŝinoj kaj la meĥanismo de la lifta komerco, sed neniam vidis la finan produktaĵon. Mi scivolis kiel la “movanta eskalatoro” funkcias. Kiam unu el la plej grandaj magazenoj en Budapeŝto, Corvin Áruház, mendis eskalatoron por sia trietaĝa konstruaĵo, mi petis al la ĉefinĝeniero, ĉu mi povas vidi ĝin funkcianta. Post kelkaj tagoj la fabrikestro petis min eniri la fabrikon. Kiam mi aliris, la ĉefinĝeniero petis min stari sur la unua ŝtupo, por ke mi vidu kiel ĝi funkcias. Li premis butonon kaj la eskalatoro moviĝis, sed ne estis apogbarilo! Mi panikiĝis, kriante “Haltigu ĝin!” Ĉiuj ridis kaj informis min “Vi deziris sperti kiel ĝi funkcias; nun vi povas konstati, kian mirindan maŝinon ni produktas.”

Ĉiun tagon mi telefonis al onklino Lola (por Charlotte) por babili. Iun tagon ni informiĝis, ke ĉiu telefonvoko estu registrita en libron. Ĉiuj ridis pri tio, sed mi ne komprenis kial. Kiam oni kontrolis la libron de privataj alvokoj, ĝi estis plena je alvokoj al onklino Lola.

La komizo de la firmao estis juna inĝeniero, S-ro Selinger. Mi sciis, ke li havas amikinon, kiun li telefonis ĉiun tagon. Iun tagon, li forestis de la laborejo, supoze pro vundo al la gambo, kiu donis doloron dum promeno. Tamen, neniu kredis, ke la akcidento estis reala. Kiam S-ro Selinger revenis por labori, li promenis nenormale. Mia aŭdaco kuraĝigis min trompi lin. Mi laŭte elkriis “Sinjoro Selinger, telefono por vi.” Li komencis kuri senlame. Kompreneble, ni ĉiuj ridis.

### Geedziĝo 1930

Miaj gepatroj ĝeniĝis pri mia estonteco. Ili deziris, ke mi edziniĝu

*Daŭras* **>**

kaj establu hejmon. Post la labora tago, irante hejmen, mi ĉiam vizitis patron en lia butiko. Ofte patro enkondukis min al juna viro, kaj petis tiun, “Promenu kun mia filino hejmen, mi petas.” Ĉar mi ŝatis sendependecon, mi mem deziris elekti mian edzon kaj ne estu “enkondukata” al tiu. Mi metis reklamon en taga ĵurnalo kaj tiel renkontis kelkajn junajn virojn. Iun el tiuj, Béla Glück, mi elektis kiel mian edzon. Béla estis arkitekto kaj subtenis sian vidvinan patrinon. Li havis pli aĝan fraton, Ernest, kiu loĝis en Svislando. Béla ĉiam bonkvalite sin vestis, havis korpon bonproporcian, belajn manojn kaj mienon facilaniman. Li estis iom pli alta ol mi. Li ofte atendis min ĉe la pordego de la fabriko. Iun tagon dum li atendis, pluvegis, sed bonŝance li portis ombrelon. Li diris, ke li deziras, ke ni kune iru al lia domo por ke mi renkontu lian patrinon. Mi diris al li, ke unue li devas peti permeson de mia patro por ke mi akompanu lin ien. Kiam mi prezentis lin al mia patro, mi feliĉis rimarki, ke patro kaj Béla bone interrilatas. Tamen mi kredis, ke mia patrino havus la findecidon. Bedaŭrinde patrino kaj Béla ne tiel bone interrilatis, plejparte, mi opinias, ĉar patrino ne konversaciis hungarlingve kaj Béla ne germane.

La amindumado komenciĝis kaj je Kristnasko 1929 ni gefianĉiĝis. Ni geedziĝis la 2an de marto 1930 ĉe la sinagogo Dohány utca. (Ĝi estas la plej granda sinagogo en Eŭropo, kun 5000 seĝoj kaj perfekta akustiko. Apude estas la fama juda muzeo, kiu elmontras valorajn kaj rarajn relikvojn.) La patrino de Béla diris, ke ŝi havas du filojn kaj nun unu filinon. Ŝi kare amis min.

Arkitekta amiko de Béla laboris por firmao, kiu konstruis apartamentojn. Per li ni aĉetis apartamenton kun du dormoĉambroj, en Ipar utca 3. Nelonge post la geedziĝo kaj vizito al fotisto, ni iris por nia mielmonato ĉe Abbazia, feriejo en norda Italio. Revenante, ni ĉirkaŭvojaĝis por viziti la fratojn de mia patrino kaj iliajn familiojn en Vieno.

Post du jaroj ni transloĝiĝis al Erzsébet kórut 24, apud la urbocentro, en apartamento kun du litoj kaj granda balkono superrigardanta la straton. E



*Sinagogo de la strato Dohány*

# Aŭstralia kongreso de Esperanto kaj somerkursaro, Adelajdo

**ST ANN'S COLLEGE • 5 – 11 JANUARO 2025**




Por esperantistoj kaj lernantoj

- Klasoj de Esperanto je du niveloj
- Vespero de teatro kaj muziko
- Bankedo
- Ekskursoj de Adelajdo
- Prelegoj pri Esperanto kaj aliaj temoj
- Babilado kaj ridado
- Jarkunveno

Instruistoj:

**Trevor Steele**, fama aŭstralia Esperanta aŭtoro

**Hoan Trần**, Esperanto-instruisto el Vjetnamio


Plia informo kaj por aliĝi:
**esperanto.org.au/kongreso**


---

# Solvoj de la enigmoj

## Oftaj birdoj de Aŭstralio kaj Nov-Zelando

(De paĝoj 21 kaj 22)








## Agnoskoj pri fotoj

**Kovrilo** David Rockell
**4** Heather Heldzingen
**5–8** Peter Johns
**9–11** David Rockell
**12** Franciska Toubale
**13** Kit Kelen
**14** Vladislav Babienko per Unsplash
**16** Klara Kulikova per Unsplash
**18–20** OpenStreetMap
**20** Esperanto Court: Joanne Johns
**23–26** Heather Heldzingen
**28** Wikipedia. BY-SA 3.0
**29** St Ann's College
**32** Internacia reta kunveno per Zoom, uzante Esperanton: Jonathan Cooper

# Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
(07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Joanne Johns | **Secretary**

**Committee Members:**
Terry Manley, Esther Parris

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



# New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@
gmail.com
0800 350 781

Bradley McDonald | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

**Committee Members:**
Erin McGifford, Josuo Moss, Stephen Epstein

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

# What *is* this?

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it's actually Esperanto.

**What is Esperanto?**

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn't have to speak Finnish and they wouldn't have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It's spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed to be easy to learn. It's completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There's an Esperanto version of Wikipedia, which has over 300 000 articles (more than the Hebrew version, for example).

**Isn't English enough?**

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

